

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE
Peranto: IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 - TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 3 F. Abono: 13 F. Kotizo: 2 F. Sume: 15 F. ====

N. B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de februario, majo, aŭgusto kaj novembro.

==== N° 127 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JANUARO 1981 ====

BILETO DE LA PREZIDANTO.

L' Episcopat français, réuni à Lourdes cet été, a mis l' accent sur l' effort missionnaire, plus nécessaire que jamais, à développer dans les communautés chrétiennes de France et du monde. Cet effort doit être autant celui des laïcs que des membres du clergé.

Au cours de cette assemblée, nos évêques se sont préoccupés du rôle que jouent les diverses formes de communication sociale dans la formation et l' évolution des opinions des masses, notamment à travers les divers réseaux d' information, et généralement les mass-media.

Nous retiendrons spécialement de leurs réflexions communes celles par lesquelles nous nous sentons particulièrement concernés.

La présence des chrétiens, parmi le large pluralisme du mouvement espérantiste, doit plus que jamais témoigner de la place éminente du spirituel.

Le communiqué final publié par l' Episcopat français indique sur quels points l' effort doit se développer, notamment en faisant appel aux techniques les plus modernes, afin de pénétrer, à travers elles, partout où elles apportent la plus grande efficacité. A cet effet, il faut engager le dialogue avec les professionnels: presse, radio, télévision et autres moyens audio-visuels, autant pour qu' ils respectent la vérité dans l' information, que pour que ceux qui le peuvent, participent à la vaste action de pastorale qui est celle de l' Eglise.

Enfin, en conclusion, disent nos évêques: "il faut élargir nos préoccupations de pastorale aux dimensions internationales de la communication."

Evidemment, cette directive rejoint plus particulièrement nos préoccupations et nos buts. La Langue Internationale nous donne le moyen privilégié d' action à la base, par le contact des personnes, des famille à famille, de groupe à groupe, à travers les frontières, sur un terrain où d' autres sont retenus par l' obstacle de la diversité des langues.

Ainsi, selon les termes même du document épiscopal, "il nous appartient d' être conscients de notre responsabilité, pour que soient entretenus les échanges visant à connaître, et à faire connaître, l' expression de la foi et de la culture chez les autres peuples."

Si ce billet vous offre ce texte à méditer, c' est que le prochain congrès annoncé officiellement d' autre part, aura pour thème central le suivant:

"LA LANGUE INTERNATIONALE, LES ECHANGES ENTRE CROYANTS SUR LE PLAN CATHOLIQUE ET OECUMENIQUE."

pour le succès de ce congrès, nous invitons tous nos membres à consacrer une part de leur action à ces correspondances, rencontres, échanges avec leurs amis esperantistes étrangers. Nous demandons à tous, qu' ils projettent ou non d' être présents, de nous adresser des témoignages de ces contacts, des comptes-rendus succincts des lectures de revues ou bulletins rapportant des faits religieux ou culturels, des lettres ou photocopies de lettres portant sur le même sujet, des textes éclairant l' attitude, à à l' étranger, devant des problèmes comparables aux nôtres ou spécifiques.

Tout ceci entre, évidemment, dans la pratique normale de ceux qui adhèrent à notre mouvement; mais 1981 ~~xxx~~ doit être à la fois un pas en avant dans cette pratique, et l' occasion de réunir idées et documents dans un but d' ouverture vers les milieux qui ont, sans peut-être en avoir conscience, besoin de l' Esperanto comme moyen de faciliter ces communications, dans l' esprit dont il est question ci-dessus.

Dans ces temps, consacrés à l' Epiphanie de N.S. et en ce début d' année, je vous adresse, avec les membres du Comité Directeur, mes vœux pour que chacun, dans des rapports fraternels avec le monde entier, soit un semeur de paix et d' amour, et un porteur de la Bonne Nouvelle.

René-Claude COLAS.

P R E G O

En la ventplugita dezerto
Mi ĵetos manplenon da semoj
Per tiu dolorlaca mano.
Mi klopodos kaj rikoltos.
La ŝvite maturajn spikojn al Vi mi ofer~~os~~
Sur tera altaro;
Mi oferos min mem, Sinjoro.
Ho Sinjoro, venu...

Mi deziras trovi liberecon;
Finfine forflugas la mallumo,
Mateno lumigas la mondon.
Ho Sinjoro, venu.

El korea poeto Kim-Chi-Ha tradukis A.B.

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 12-a de OKTOBRD 1980.

Ĉeestas: P. Degrelle, F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-inoj Preux kaj Vanneau, S-roj Colas, Despiney kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: P. Bourdon kaj S-rin Bessière.

Observanto: P. Jan-Johano Sadowski el Pollando.

La kunveno komenciĝas je la 14.30 per la kanto al la Virgino "Donu vian Filon" pro la rozaria monato.

Ni aprobas la protokolojn de la antaŭaj kunvenojn (9/3 kaj 1/6) kaj la tagordon.

Kongreso en Sens: tre agrablan restadon en la monaĥinejo. Rimarkindan disciplinon de la lernantoj de P. Schneider.

La prelego estis tro altnivela kaj ne ebligis veran dialogon.

La ĉefepiskopo de Sens sendis kuraĝigan leteron.

Diservo dum la UK en Stokholmo: ekumena diservo en Esperanto okazis en la katedralo kun ĉirkaŭ 500 gepartoprenantoj.

Kongreso FKEA 1981: P. Degrelle bonvolas prizorgi la aferon en Nancy. Datoj: 1-a ĝis 4-a de majo.

IKUE kaj FKEA : kelkaj francaj anoj de IKUE ne estas anoj de FKEA kaj inverse. Certe estas malavantaĝo por ambaŭ kategorioj ! Laŭstatuto e, la Prezidanto de la landa asocio estas ankaŭ membro de la Plenumkomitato de IKUE. S-ro Colas rilatos kun la Prezidanto de IKUE pri tio.

Agadplano de du germanaj pastroj, Eischkorn kaj Müller : instrui esperanton en la porpastraj seminarioj. Peti la nomojn kaj adresojn de la seminarianoj de la prizorganto en la lando, sendi al ili informojn, invitilojn ... Speciala Komisiono tradukas la leterojn. Ĉiu, kiu konas seminarianojn, priparolas tiun temon.

La bulteno : la ĉeestantoj estas kontentaj. Ili legas ĝin tute kaj pluzure. Dezirindas tradukotaj esprimoj kaj pli da tradukproponoj por la lingva angulo. Dankon al D-ro de Salvo pro liaj interesaj artikoloj.

Financoj : abono kaj kotizo estas tre modestaj. Tial, oni rajtas pagi pli, sed ne malpli ; Bonvenaj estas dumvivaj kaj bonfaraj membroj.

Ĉar la mono pli kaj pli ŝanvaloriĝas, la komitato decidas malfermi specialan fonduson por havigi al FKEA freŝan monon (propono de P. Degrelle). La fonduso nomiĝas "frataro Claudius Colas", kaj danke akceptas monsumon.

Diversaĵoj : la revuo "Missions-Messages" aperigis priesperantajn artikolojn de Patrick Moyelle. La 14-an de septembro okazis en Banneux (Belgujo) la 4-a Esperanta pilgrimo al la Virgino le la Malriĉuloj (30 partoprenantoj el 6 landoj). D-ro Kondor sugestas disdonon de la programo de Vatikana Radio al pastroj, seminarianoj, K.a. kun atentigo pri la Esp°-dissendoj.

\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 7-a de DECEMBRO 1980.

Ceestas : P. Degrelle, S-inoj Michau kaj Vincent, F-inoj Preux kaj Vanneau, S-roj Eessière, Colas kaj Despiney.

Petis senkulpigon : P. Bourdon, F-to Marmou kaj S-ro Villeneuve.

La kunveno komenciĝas je la 14.30 per la kanto "Mesio Dia venu" en tiu adventa tempo. Oni anoncas la forpason de s-ino Lavallée, DM de la asocio. Oni aprobas la ĉi supran protokolon kaj la tagordon .

Kongreso 1981 : pro neatenditaj malfacilaĵoj, ĝi ne povos okazi en Nancy. Ni klopodos en Gresilon aŭ Rouen.

IKUE kaj FKEA : 67 francoj estas anoj de IKUE. Oni planas paĝon por gejunuloj en EK. Sendu artikoletojn, anekdotojn ...

Agadplano de la du germanaj pastroj : S-ino Vincent tradukis la artikolon pri la ski-ferioj. Ni atendas raporton de la interesatoj.

La bulteno : por pli da oportunaĵoj, la Komitatokunvenos unu momato pli frue ol antaŭe, t.e. en februaro, majo, junio, novembro, kaj sekve la bulteno aperos respektive en marto, junio, septembro kaj decembro. Listo de la IKUE-membroj aperos en la bulteno, ĉele al eventuala reĝustigo. La junaj legantoj atendas viajn amuzajn historietojn por la "ridangulo". Sendu amase !!

Financoj : la fruaj kotizpagantoj ege helpas al la bona ekvilibro de la kaso, Pensu pri "Frataro Claudius Colas", kiu akceptas ian ajn donacon.

10-a orientiĝo proponita de la Asembleo de la francaj episkopoj en Lourdes : "Koni kaj konigi la kulturajn esprimadojn de la aliaj popoloj. "Tio povos esti la temo de nia kongreso 1981. Kelkaj sugestoj : per la leteroj ricevitaj, oni povas konigi la alilandajn kulturojn. Traduko de libroj. Prezento de verkoj en Esp°. Konigi la eblecojn de la IL. Prezenti lumbildojn pri diversaj landoj. Legantoj partoprenu ! Agu en viaj lokoj, raportu, kaj ni sendos oficialan leteron al la sekretariato de la Episkopoj post la kongreso.

Diversaĵoj : Malbona stato de la tombo de P. Peltier en Lourdes. P. Degrelle sendos artikolon pri tio al EK. Necesus krei specialan kason ĉe IKUE por rebonigi la tombon. En "Témoignage chrétien" aperis artikolo pri la ekumena diservo en Stokholmo. P. Degrelle, peranto de IKUE, havas ties libroservon. Eblas aĉeti de li ian ajn libron de la listo aperinta en EK. S-to Colas sendis al Radio-Vatikana leteron por danki P. Jacobitti pro lia laboro en la stacio.

La kunveno finiĝas je la 17.00.

La venonta kunsido okazos la 15-an de februaro 1981 je la 14.30. Observantoj estas daŭre bonvena.

Eblas alveni ekde la 11.00 kaj tagmanĝi en la memserva restoracio Bastille.

\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$\$

LINGVA ANGULO

Al la esprimoj proponitaj en n^o 126 venis respondoj de G-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), GUILLON (G), LE MARQUAND (L), MICHAU (M), RIBOT (R) kaj F-ino STANIENDA (S) el Pollando. Jen ili:

1) franc comme l' or: sincerega, tute nekaŝema, kun sincereco el pura oro (B); valore verdirema, bonege sincera (D); neta same kiel pura oro (G); sincera kiel pura oro (L); nedubinde sincera, senmiksa kiel pura oro (M); tiel verama kiel oro pura (R); sincerulo, malinsida, pura kiel oro (S).

2) c' est un franc diable: li estas sentimulo (B); sincera gajulo (D); malkaŝema diableto (G); vera diablo (L); aŭtenta diablo, fripono (M); li estas bankora (R); honestulo, bonega junulo (S).

3) franchir la cote d' alerte: transpasi la nivellimon (B); trapasi la danĝeran limon (D); transpasi la alarman limon (G,M); superi la alarman nivelon (L); superi la danĝerlimon (R); transpaŝi la kritikan punkton, kritikan gradon, danĝeran nivelon (S).

4) franchir le mur du son: transpasi la sonbarieron (B); superi la rapidecon de la sono (D); transflugi la sonlimon (G); transiri la sonmuron (L); transpaŝi la sonan rapidecon (M); superi la sonrapidon (R); trapaŝi la netrapaŝeblan obstaklon, transpaŝi la limon, la ekstremon de ebleco (S).

5) se frayer un passage: trabati al si vojon (B,S); ebenigi sian vojon, pene trapasi (D); trabati pasejon (G); trabati vojon, ebenigi pasejon (L); malobstrukcii sian vojon (M); trabori al si vojon (R); trapuŝiĝi, puŝi sin tra la homamaso, fari al si vojon (S).

6) frétiller comme une anguille: svingetiĝi kiel angilo, angile svingetiĝi (B); svingetiĝi kvazaŭ angilo (D); gajege svingiĝi, same kiel angilo (G); angile svingiĝi (L); tordsvingiĝi kiel angilo (M); agitiĝi kiel angilo (R); flirti kiel angilo (S).

7) c' est pour la frime: tio celas nur trompaĵojn (B); estas trompiga ŝajno (D); tio celas tempoŝajnojn (G); estas ŝajnige (L); estas nur pro trompoŝajno (M); nura ŝerco! nura blago! nura ŝajniĝo! (R); por ŝajno, ŝajme, por falsa vidiĝo, falsaspekto (S).

8) friser la quarantaine: najbari la kvardekaĝon, iĝi preskaŭ kvardekjara (B); esti atingonta la 40-an jaraĝon, esti preskaŭ 40-jara (D); esti proksimume kvardekjara (G); baldaŭ kvardekaĝiĝi (L); apudesti kvardekjara (M); li preskaŭ kvardekjaras (R).

9) friser la correctionnelle: tanĝi la puntribunalon (B); esti preskaŭ enkarcerinda (D); riski punan proceson (G); tanĝi punjuĝon (L); ebligi juran punon (M); odori punkortume (R); froti sin kontraŭ la punkodo, riski alvokon antaŭ la tribunalo (S).

10) il ne fait pas bon s' y frotter: lia ŝelo estas dorneca, kiu lin tuŝas, tiu lin sentas (B); ataki lin estas riska afero (D); ne estas konsilinde lin provoki (G); danĝeras kontraŭstari lin (L); kiu tion frotas ricevas pikon, ne taŭgas enmiksiĝi en tio (M); danĝere esti (lia) kunulo, iri al li (R); ne estas bone tuŝi tiun aferon, estas danĝere kontaktiĝi kun tio (S).

Unua klasifiko por 1981: 1) en egaleco S-roj LE MARQUAND kaj RIBOT (8p.); 3) en egaleco S-roj DAUCHEZ kaj GUILLON (7); 5) en egaleco S-ro BOURGOIS, S-ino MICHAU kaj F-ino STANIENDA (5).

RIMARKOJ: a) bariero estas materia obstaklo; kiam temas pri ia obstaklo, materia aŭ ne, oni uzu "barilo".

b) oni "iras" nur per naturaj iloj (piedoj, flugiloj, naĝiloj), "paŝas" nur per piedoj. Sekve, ne eblas trans-iri aŭ -paŝi la sonrapidon, sed nur superi aŭ transpasi, pli bone transflugi ĝin. (ne "tra", sed trans, kiu montras alvenon al pli malproksima loko).

Jen kelkaj tradukotaj esprimoj proponitaj de S-roj Bourgois, Lecroisey kaj F-ino Stanienda: 1) prendre ombrage de; 2) fuir ses responsabilités; 3) fusiller du regard; 4) c' est mon petit doigt qui me l' a dit; 5) à pigeon vole; 6) être sur la paille; 7) autant vouloir tirer un pet d' un âme mort; 8) mener en bateau; 9) avoir du foin dans ses bottes; 10) mettre du beurre dans ses épinards.

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1980.

ENSPEZOJ		!	ELSPEZOJ	
Kotizoj	1 791,50	!	Bulteno	1 219,25
Donacoj	495,50	!	Korespondado	728,00
			Vojaĝoj	669,50
			Diversaj	181,00
	<u>2 287,00</u>	!		<u>2 797,75</u>
En la kaso la 1/1/80	2 042,21			
Negativa saldo la 31/12/80	<u>510,75</u>			
En la kaso la 31/12/80	<u>1 531,46</u>			

+++++

JEN DU POEMOJ, kiujn P. Degrelle dediĉas al sia litova amikino A. Jucdickiene

Soru mia preĝo danke fila
 Pro Jesua dorm' en povro troga,
 Jen alflirtas teren ĝoj' prologa,
 Jen fariĝas kredo pli facila.

Ĉu vi vidas bebon en trankvila
 Mezo de silento dialoga,
 Dum bestspiro lante reciproka
 Peras por donac' de varm' humila?

Ĉu samkiel sur la knara ŝipo
 Kerne de l' disĉipla fidoŝtipo
 Vi kuŝenas rande en ripozo?

Svinge startu do laŭ tuja preto
 Mia jeso vela por la krozo
 Tra la savanonc' de l' amkvieto! 12/12/1980

Ĉu veras, ke Jesuo naskiĝas por savi nin?
 Ĉu veras, ke l' anĝeloj ĝojkantis pri la paco
 Ĉe l' alvoko ŝafistojn al l' humila palaco?
 Ĉu veras, ke Maria reĝinas Dipatrin'?

Ĉu veras, ke Jozefo, fianĉo ĝis la kulmin'
 De l' fidelec' daŭras nur nutropatro sen laco?
 Ĉu veras, ke la Magoj alportas por donaco
 La riĉe plenajn kestojn post la gesta kultoklin'?

Akras, ĉar pliaj homoj tro kruelece mortas
 Pro malsano, pro maljust' aŭ sur la korpo portas
 La spurojn de l' rasismo, la vundojn de la tristo.

Akras, ĉar freŝaj beboj ĉe l' eko de sia viv'
 Sen propra kulpo spertas pri la malsatofensiv'.
 Ĉu sur l' altar' golgota vi jam krucpendas, Kristo? 12/12/1980.

+++++

NIA MEMBRARO.

Novaj membroj 1981: 1) S-ro PONS (L & C); 2) F-ino HERAUD (Paris); X)

Koran bonvenon al ili!

Membroj bonfarantoj: 1) F-ino TISSOT (Loire); 2) S-ro LÆ MARQUAND (C-du-N); 3) S-ro BESSIERE (S-M); 4) S-ro BIRON (Sarthe); 5) F-ino ESPRIT (Hte-M).

Grandan dankemon ni ŝuldas al ili, ĉar ili multe helpas nian agadon.

+++++

FRATARO CLAUDIUS COLAS (v. p. 3): 1) S-ino Michau; 2) F-ino Vanneau; 3) S-ro Despiney; 4) P-ro Degrelle; 5) S-ino Vincent. Sumo ricevita: 235 F.

Tutkoraŭ dankon, ne nur al la aliĝintoj, sed ankaŭ al la aliĝontoj.

EL NEDERLANDO (sendis X. Dauchez)

pri la konduka permesilo, ekzistas homoj, kiuj 15 fojojn malsukcesis!

Antaŭ kelke da tempo, multaj homoj vojaĝis al Egiptujo por tie akiri la egiptan diplomon por konduki aŭtomobilon. Tio estas tre facila en tiu lando: oni pagas la ekzamenan sumon, veturigas la aŭtomobilon unu fojon antaŭen, unu fojon malantaŭen, kaj oni ricevas la permesilon!

Reveninte en Nederlando, oni montris la permeson al la aŭtoritatoj kaj ricevis la nederlandan permesilon.

Ĉar ĉiam pli da homoj tiel ĝin akiris, la registaro nuligis tiun eblon, kaj nun kelkaj homoj veturas al Curacao, kie la ekzameno estas ankaŭ facila...

KONFERENCO DE ĈINAJ KATOLIKAJ REPRESENTANTOJ (el EPC sept. 80)

La nomita konferenco malfermiĝis la 30-an de majo en Pekino. Ĝin ĉeestis 207 reprezentantoj, inter kiuj troviĝis 33 episkopoj, 105 pastroj, 2 monaĥoj, 6 monaĥinoj kaj 61 laikoj. La 3-taga konferenco ellaboris statuton de la Administra Komisiono de la Ĉina Katolika Eklezio, elektis gvidantaron kaj aprobis la "Mesaĝon al la Tutlandaj Episkopoj kaj Laikoj" kaj la "Mesaĝon al la Taiwan-aj Episkopoj kaj Laikoj". En la konferenco Zhang Jiashu estis elektita kiel direktoro de la Administra Komisiono de la Ĉina Katolika Eklezio kaj estraro de ĝia episkopa kolegio

NEKROLOGO.

Ni priploras la forpason de nia dumviva membrino S-ino Helena LAVALLEE el Le Havre. Ŝi mortis la 13-an de novembro 1980; ŝi estis 81-jara. Eksinstruistino, ŝi lernis Esperanton, post sia emeritiĝo, kaj ricevis la Pedagogian Ateston; ŝi gvidis multajn kursojn, partoprenis multajn UK k.a.

Ni preĝu por la ripozo de ŝia animo.

INFORMOJ.

- 1) P. Degrelle, nia peranto por IKUE, peras ankaŭ por "Bulgara Esperantisto", unu el la plej bonaj Esp^o-gazetoj. Abono: 20 F. Inf. P. Degrelle. (v.p. 1)
- 2) La Renna Esp^o-klubo 9, square de Provence 35000 RENNES (Villejean) p.ĉ.k. 391 45 W Rennes, eldonis belajn festkartojn kun teksto en la bretoma kaj Esp^o. Prezoj afrankite: por 1, 3,70; por 10, 25,20; por 20, 48,88; por 50, 101,30; por 100, 179 F. 46,30

RADIO ROMA - ESPERANTO

Teksto de Ivo Murgia, trad; A. De Salvo.

Laŭ la itala pensmaniero, la sakristianoj (nome, tiuj homoj, kiuj zorgas pri la kult-objektoj en la preĝejoj) estas homoj, kiuj pro iuj mankoj, fizikaj aŭ mensaj, estas devigataj akcepti ĉi tiun laboron, kvankam ĝi kuntrenas malpliigon de la homa digno laŭ la tradicia modelo.

La oficiala difino de la sakristianoj, laŭ la katolika liturgio, estas "gardistoj de la sanktaj lokoj kaj objektoj". En Italujo, ili estas preskaŭ 10000. Antaŭ nelonge, ili okazigis kongreson. Oni diskutis pri ekonomiaj problemoj kaj postuloj. Fakte, precipe en la urboj laŭgrade malaperas la tradicia sakristiano, kiu kontentiĝadis per simpla maŝino, tranoktejo kaj eventuala poŝmono. Sed en la kongreso, oni parolis ankaŭ pri la digno de la laboro de la sakristianoj, kiuj havas multajn kaj pezajn taskojn: prizorgado de tabernakloj, orda aranĝado de la preĝejo, sonorigo de la sonoriloj (ĉiam pli ofte helpataj aŭ eĉ anstataŭataj de meĥanikaj aparatoj). Certe la sakristianoj pravas, kiam ili substrekas la gravecon de propra laboro por la vivo de la eklezia komunumo. Kaj ili ankaŭ pravas, kiam ili petas, ke ilia pozicio estu reguligata en maniero certa kaj egala, kun ĝusta salajro. Ĉiuj nuntempaj homoj sentas la rajton partopreni en la socio, kaj oni ne povas pretendi, ke nur sakristianoj estu homoj rezignemaj. Kompreneble, la postuloj de la sakristianoj influos sur la buĝetojn de la paroĥoj; kaj tio havos rimarkindajn sekvojn.

LISTO DE LA IKUL-MEMBROJ 1980

Amoureux J. 66000 Perpignan; Arney A-M 35400 St-Malo; Augen A. 03290 Dompierre/Bresbe; Bailliencourt C. 70400 Héricourt; Baradel R. 38470 Vinay; Bessière A. 76000 Rouën; Biron L. 72000 Le Mans; Cheverry B. 49000 Angers; Colas R.C. 75000 Paris; Colleu M. 92140 Clamart; Cugny P. 21000 Dijon

KONGRESO DE FKEA

GRESILLON 1/3-an de majo 1981

KONGRESEJO: Kastelo GRESILLON 49150 BAUGE

ALIĜKOTIZOJ: individuo 20 F; geedzâ paro 30 F; infano ĝis 16-jara, blindulo, alilandano, sacerdoto, religiulo(in)o, KELI-an: senpage

LIMDATO DE ALIĜO: 31-an de marto 1981.

PROVIZORA PROGRAMO

Vendredon 1-an de majo: 9.30: prezentado de la kongresa temo "La Langue Internationale, les échanges entre croyants sur le plan catholique et œcuménique

11.30: kantezercado prepare al la diservo

posttagmeze: vizitado de Baugé

post la vespermanĝo: varietea vespero - kantezercado

Sabaton 2-an de majo: 9.30: ĝenerala kunveno

11.30: komitatkunveno

14.00: debato pri la kongresa temo

hora fiksota: diservo

post la vespermanĝo: distra vespero

Dimanĉon 3-an de majo: 10.00: daŭrigo de la debato

posttagmeze: programo fiksota

N.B. Eblas alveni ĵaŭdon 30-an de aprilo: vespere, kaj resti ĝis lundo matene.

Bonvolu kunporti buŝ- kaj tualet-tukojn, kaj la KANTIĜARON!!

ALIĜILO (1)

sendota al Assoc. Cath. Franç. pour l' Esperanto 26 bis, rue de Milngavie 49150 BAUGE antaŭ la 30/3/81 p.ĉ.k. ROUEN 2324 93 N.

Mi aliĝas al la kongreso laŭ la ĉisupra kondiĉoj kaj sendas la pagon per poŝtĉeko/bankĉeko (2)

kotizo (en kategorio) F

S-ro/S-ino/F-ino (2) (nomo kaj voknomo)

adreso:

naskiĝdato (nur por infanoj):

Mi bezonas fervoja(j)n rabatilo(j)n

(1) Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu familiano; pliaj ekzempleroj haveblas ĉe la ĉisupra adreso.

(2) Forstreu la senutilaĵojn.

Mi petas la jenajn servojn:

ĵaŭdon vendredon sabaton dimanĉon lundon

vespermanĝon

tranoktadon + mat.

tagmanĝon

Mi proponas la jenajn servojn:

enkasigom de la restadprezoj: JES NE

tenadom de la libroservo JES NE

prizorgadom de la infanoj JES NE

monkolektadom ĉe la diservo JES NE

aliajn:

DATO:

SUBSKRIBO:

RESTADPREZOJ: tagmanĝo: 30 F; vespermanĝo: 30 F; tranoktado + matenmanĝo: 30 F.
(trinkaĵo kaj kafe entenataj)

* * * * *

KIEL ATINGI BAUGÉ?

Paris-Montparnasse	14.09	XXXXX	18.26
Angers (1)	16.51	Le Mans(2)	20.12
	17.00		20.18
Baugé	18.10		21.58

- (1) En Angers, eliru el la stacidomo kaj iru al la turisma oficejo. La buso "Cordier" al Baugé haltas tute apude. De Paris aĉetu la bileton nur ĝis Angers.
- (2) Sidu ĉe komenco de la vagonaro; en Le Mans iru al kajo A preter la restoracio; la buso al Saumur staras ekstere. De Paris, aĉetu la bileton ĝis Baugé (via Le Mans)

AGRABLAN KONGRESON EN GRESILLON ! ! !

Cuvelier Delasus 59000 Lille; De l' -Escale A. 54140 Jarville; Despinay R. 94170 Le perreux/Marne; Doyelle J. 59630 Bourbourg; Elteto De Zilah E. 57070 Metz; Ergoll J. 44000 Nantes; Fardet R. 44000 Nantes; Goergen L. 66290 Carbère; Goudé L. 49150 Baugé; Goudé M. 37000 Tours; Gilles J. 21200 Beaune; Gourdon A. 44360 St-Etienne-de-Montluc; Jossinet R. 75010 Paris; Kraemer J. 68500 Guebwiller; Lapierré M. 94430 Chennevières/Marne; Lecocq R. 37270 Montlouis/Loire; Lecomte P. 91210 Draveil; Leeb F. 63400 Chamalières; Leval P. 03220 Chavroches; Leyder J. 38400 St-Martin d' Hères; Luez D. 02000 Laon; Martin J. 06100 Nice; Matzinger J.M. 67530 Ottrott; Mauchien R. 80000 Amiens; Marin P. 18000 Bourges; Nocq G. 76130 Mont St-Aignan; Olivaux R. 44000 Nantes; Pons R. 41016 Blois; Preux G. 59290 Wasquehal; Rannou A. 35510 Cesson Sévigné; Raux M. 02000 Laon; Ribot A. 47200 Marmande; Royer P. 78400 Chatou; Sanson C. 50000 Saint-Lô; Schneider B. 89100 Sens; Sautreuil B. 75006 Paris; Servel G. 26000 Valence; Sèvre M. 13009 Marseille; Stas A. 71120 Charolles; Tassel E. 95270 Luzarches; Thiollière E. 42100 St-Etienne; Veillard J. 75017 Paris; Vérité M. 93500 Pantin; Vernin L. 26100 Romans; Vernin P. 26100 Romans; Véron G. 61700 Domfront; Vigner J. 35400 St-Malo; Villeneuve G. 91530 St-Chéron.

Dumvivaj membroj: Bourdon L. 59000 Lille; Le Boëdec J. 56000 Lorient; Degrelle R. 54510 Tomblaine; Llech-Walter R. 66000 Perpignan; Marmou R.J. 77610 Fontenay-Tré-signy; Michau J. 45100 Orléans; Simonnet F. 94300 Vincennes; Vanneau E. 75014 Paris; Vincent J. 49150 Baugé.

La francaj IKUE-anoj estas de 68. Inter ili estas 6 sacerdotoj kaj 1 frato. Se ĉiu el ni varbus nur unu novan membron, imagu la rezulton! Do, agu!

Roger DÉGRELLE, peranto de IKUE en Franclando.

NDLR. La legantoj, kiuj ne vidas sian nomon en la ĉi supra listo, aŭ forgesis repagi sian kotizon por 1980, aŭ ankoraŭ ne estas anoj de nia Internacia Katolika Esp^o-Umuiĝo. En tiu lasta kazo, ili bonvolu pripensi la eblecon aliĝi, kaj sin turnu al la peranto, kiu tre volonte liveros al ili ĉiujn informojn.

RADIO ROMA - ESPERANTO

LA PAPO EN OTRANTO

Teksto de Carandina kaj Di Moura, trad; de De Salvo.

La 5-an de oktobro la Papo vizitis Otranton, malgrandan urbon en sudorienta Italujo, por memori la martirigon de 800 civitanoj, kiuj, antaŭ 500 jaroj, preferis esti mortigataj de la Turkoj ol fornei sian kristanan kredon.

La motivo, pro kiu la Papo akceptis iri al malgranda urbo por memori sangan eventon, kiu, cetere, eĉ ne estas multe konata ekster tiu regiono, estis klarigita de la Papo mem dum la homilio de la Meso, kiun li celebris en la loko de la amasa murdo. La Papo x diris, ke per sia vizito li intencis memori la martirojn pro la kredo, de hieraŭ kaj de hodiaŭ, kaj alvoki pacem por Meza Oriento kaj la superadon de ĉiuj pasintaj konfliktoj inter kristanoj kaj muzulmanoj.

El la loko de la murdo de la martiroj de Otranto, oni vidas la bordon de Greklando kaj de Albanio. Al ĉi tiu lasta lando, kiu troviĝas je apenaŭ 70-km de Otranto, Johano Paŭlo dua adresis sian apartan penson; li parolis pri "la heroeco de la albana Eklezio, disbatita de iu akra kaj longa persekutado, sed pliriĉigita per la atesto de siaj martiroj". La Papo plivastigis ĉi tiujn pensojn "al ĉiuj kristanaj gefratoj, kiuj spertas similajn travivaĵojn", kaj li emfazis, ke oni devas senti sin proksimaj al ĉiuj, kiuj estas trafataj de la perforto pro sia kredo. La Papo substrekis, ke ofte oni klopodas ŝajnigi la martirojn kulpuloj pri politikaj krimoj; kaj li invitis preĝi por la persekutantoj kaj por tiuj komunaĵoj, kies fundamentaj rajtoj estas nerespektataj aŭ tute forigataj.

KRIPOJ EN ITALUJO

Teksto de Fagioli, trad. de De Salvo.

Kripoj (nome, reprezentaĵoj de Kristnasko) estas, tre ofte, veraj artverkoj. Da ili ekzistas ĉie en Italujo, ankaŭ ĉar ĝuste tie naskiĝis tiu tradicio.

Romo, centro de la katolika mondo, proponas centojn da kripoj; la plej elstara estas tiu aranĝita en la baziliko "S-ina Maria la Granda", nome en la baziliko starigita de tiu Papo Liberio, kiu fiksas je la 25-a de decembro la feston de Kristnasko. Mirindaj subĉielaj prezentaĵoj troviĝas en Placo Navona kaj ĉe la Stuparo de la Triunuo de l' Montoj, dum la renesanca strato Giulia (Ĝulja) estas rezervita ĉijare al la polaj kripoj de Krakovo.

Sed la sudo, per sia folkloro, proponas la plej interesajn kripoj. En la

../...

